

Eduardo
Bellamy

la parabolo
pri la cisterno



Eduardo
Bellamy

L A

P A R A B O L O

P R I

L A

C I S T E R N O

-"-

Suplemento
de

La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut

Apr. 1974 - N-ro 97 B

Eduardo Bellamy:

LA
PARABOLO
PRI
LA
CISTERNO

Estis iam tre seka lando, kies popolo tre bezonis akvon. Ĝi faris nenion ol serĉi akvon de la mateno ĝis la vespero kaj multaj pereis, ĉar ili ne povis trovi ĝin.

Tamen estis en tiu lando ankaŭ kelkaj homoj, pli ruzaj ol la aliaj, kaj ĉi tiuj estis kolektintaj akvoprovizon, dum la aliaj nenion povis trovi. La nomo de tiuj homoj estis kapitalistoj.

Tiel okazis, ke la homoj el tiu lando venis al la kapitalistoj kaj demandis, ĉu ili volos doni akvon al ili por trinki el la akvo kolektita, ĉar ili multe suferas pro granda akvomanko.

Sed la kapitalistoj respondis : - Iru for, vi malsagaj homoj ! Kial ni donus akvon al vi el la akvoprovizo kolektita de ni, ĉar tiam ni fariĝus tiel same kiel vi kaj kun vi pereus ! Sed vidu, kion

ni faros por vi : Estu niaj servistoj kaj vi havos akvon. Kaj la popolo diris: donu al ni nur akvon kaj ni estos viaj servistoj, ni kaj niaj infanoj. Kaj tiel okazis.

La kapitalistoj estis saĝaj homoj kaj distingigis per saĝo super sia generacio. Ili dividis la popolon, kiu servis ilin, en grupojn sub la ordono de oficiroj kaj estroj kaj sendis kelkajn grupojn al la fontoj por ĉerpi kaj aliajn ili sendis por serĉi pri novaj fontoj kaj aliajn por porti akvon. Kaj ĉiom da akvo estis portita al iu loko kaj tie la kapitalistoj konstruigis grandan cisternon por konservi la akvon kaj tiun ujon ili nomis la Merkato. Tien devis veni la servistoj de la kapitalistoj por akiri akvon. Kaj la kapitalistoj diris al la popolo : Por ĉiu sitelo da akvo, kiun vi alportos al ni, ni donos al vi po unu penco kaj por ĉiu sitelo da akvo, kiun ni ĉerpos el la cisterno, por ke vi povu trinki, vi kaj viaj edzinoj kaj infanoj, vi donos al ni po du pencoj. Kaj la diferenco estos nia profito, ĉar ni ne farus ĉion ĉi por vi, se ne estus por tiu profito kaj vi do ĉiuj devus pereii.

Kaj tiel estis bone en la okuloj de la servantoj, ĉar ili havis malviglan intelekton kaj ili diligente alportis akvon en la cisternon dum multaj tagoj kaj por ĉiu sitelo, kiun ili alportis, la kapitalistoj donis al ĉiu viro po unu penco. Sed por ĉiu sitelo, kiun la kapitalistoj ĉerpis el la ujo kaj donis al la popolo por trinki, la popolo donis al la kapitalistoj po du pencej.

Sed post kelka tempo la cisterno, kiu nomiĝis Merkato, estis plenplena kaj la akvo transbordiĝis, ĉar por ĉiu sitelo, kiun la akvoportistoj verŝis en la cisternon, ili reakiris nur tiom, ke ili povis aĉeti duonan sitelon. Kaj pro la restaĵo, kiu kuŝis en la cisterno, ĉi tiu baldaŭ tropleniĝis, ĉar da portistoj estis multe, da posedantoj nur malmulte kaj ĉi tiuj ne povis trinki pli ol la aliaj. Tiel okazis, ke la cisterno estis plenplena. Kiam la kapitalistoj vidis, ke la akvo fluas trans la randon, ili diris al la popolo :

- Ĉu vi ne vidas, ke la akvujo, kiu nomiĝas Merkato, estas tro plena? Sidiĝu kaj atendu pacience ĝis la cisterno ree estos malplena; ni tiam redungos vin.

Sed kiam la popolo ne plu ricevis pen-

cojn de la kapitalistoj, ĝi ne plu povis aĉeti akvon, ĉar posedis nenion por pagi. Kaj la kapitalistoj maltrankviligis, vidante, ke ili ne plu ricevas profiton, ĉar neniu aĉetis akvon de ili. Kaj al la grandaj vojoj ili dissendis virojn, kiuj devis voki : Ĉiu kiu soifas venu al la cisterno kaj aĉetu akvon de ni; estas sufiĉa provizo !

- Ĉar, diris la kapitalistoj inter si, vidu, la tempoj estas malbonaj, ni devas reklami.

Sed la popolo respondis : Kiel ni povus aĉeti, kiam vi ne dungas nin, dum ni volonte aĉetus akvon, ĉar ni soifas. Kaj vi ne bezonus reklami.

Sed la kapitalistoj diris al la popolo: - Ĉu ni redungu vin por ankoraŭ alporti pli da akvo ? Kiam la cisterno, kiu nomiĝas Merkato, jam superfluas ? Vi unue devas aĉeti akvon kaj kiam la cisterno estos malplena, ni denove dungos vin por plenigi ĝin.

Kaj tiel okazis, ĉar la kapitalistoj la popolon ne plu dungis por alporti akvon, ke la popolo la akvon, kiun ĝi jam alportis, ne povis aĉeti. Kaj la homoj parolis pri tiuj ĉi aferoj kaj diris : "Estas krizo".

Kaj la soifo de la popolo estis granda, ĉar ne estis nun kiel en la tagoj de la prapatroj, kiam la tuta lando estis disponebla por ili, por ke ĉiu serĉu akvon por si mem.

Sed la kapitalistoj estis uzurpintaj ĉiujn fontojn kaj ĉiujn putojn kaj akvo-provizojn, por ke neniu povu akiri akvon, escepte nur el la cisterno, kiu nomiĝas Merkato. Kaj la popolo murmuris kontraŭ la kapitalistoj kaj diris:

- Vidu, la akvujo estas plenplena kaj ni mortas pro soifo. Donu al ni akvon, ke ni ne pereu !

Sed la kapitalistoj respondis : Ne, la akvo apartenas al ni; vi ne trinkos da ĝi, se vi ne aĉetos ĝin de ni per via mono. Kaj ili ĵuris per ĵuro kaj diris laŭ siaj kutimoj : "Negoco estas negoco". Sed la kapitalistoj maltrankviliĝis, ĉar la popolo ne plu aĉetis akvon kaj ili do ne akiris plu profiton kaj ili diris unu al la alia : - Ŝajnas, ke nia profito ĉesigis nian profiton kaj pro tio, ke ni jam faris tiom da profito, ni nun ne plu povas fari profiton. Kio kaŭzas, ke nia profito ne plu estas profitdona kaj malriĉigis nin ? Ni konsultu la profetojn, ke ili klarigu al ni tiujn ĉi aferojn.

Kaj ili venigis ilin.

La profetoj estis homoj, kiuj estis kleraj kaj povis kaŝi la veron de la aferoj per multaj orakolaj vortoj. Ili sin kunigis kun la kapitalistoj por tiel akiri akvon por si kaj siaj infanoj. Kaj la kapitalistoj demandis al ili, kio kaŭzas ke la popolo ne plu aĉetas akvon de ili, kvankam la cisterno estas plena.

Kaj kelkaj el la profetoj diris : - La kaŭzo estas la tro granda produktado. Sed tiam arde kontraŭis aliaj, kiuj diris, ke la kaŭzo estas tro malgranda konsumado. Kaj denove aliaj diris, ke la kaŭzo estas makuloj sur la suno, tiel ke la tero troviĝas en malfavora pozicio. Ankoraŭ aliaj diris : Ĉio ĉi estas sen-sence; la malbono fariĝis pro manko de konfido. Kaj dum la profetoj, laŭkutime, interdisputis, la viroj de la profito dormis. Kaj kiam ili vekigis, ili diris al la profetoj : Nun sufiĉas, vi konsolis nin. Iru nun por ankaŭ al la popolo doni konsolon, ke ankaŭ ĝi trankviliĝu ! Kaj lasu nin en paco.

Sed la profetoj ne ŝatis iri al la popolo, ĉar ili ne ĝuas fidon ĉe ĝi, kaj ili diris al la kapitalistoj : - Mastroj, la sekreto de nia arto estas, ke nur ti-

uj, kiuj satas kaj ne soifas kaj havas ripozon, povas trovi konsolon per niaj paroloj. Tiuj, kiuj soifas, ne trovos pacon en niaj vortoj, kontraŭe, ili mokos nin, ĉar laŭŝajne, kiam ili ne estas satigitaj, nia saĝo estas kvazaŭ malplena kaj sensignifa.

Sed la koleraĵoj kapitalistoj diris : - Iru ! Ĉu ne estas via tasko plenumi tion, kion ni ordonas al vi ? Kaj la profetoj iris al la popolo kaj klarigis la sekreton de la tro granda produktado kaj kiel okazis, ke ili devas pereji pro soifo, ĉar estas tro multe da akvo, kaj kial la popolo ne povas havi sufiĉe, ĉar la provizo estas tro granda. Kaj tiel same ili parolis al la popolo pri la makuloj sur la suno kaj diris, ke ĉio ĉi venis pro manko de konfido.

Sed okazis tiel, kiel la profetoj antaŭ diris, ĉar al la popolo ilia saĝo ŝajnis senenhava kaj sensignifa kaj la popolo mokis ilin, kriante : - Foriru, sentaŭguloj, ĉu vi volas moki nin ? Ĉu povas el abundo naskiĝi malsato ? Ĉu nenio povas naskiĝi el multo ? Kaj ili kolektis ŝtonojn por ĵeti al ili, kaj la kapitalistoj timis, ke la popolo perforte alproprigus al si la akvon ella cisterno. Tiam ili

sendis iujn sanktajn virojn (sed estis falsaj pastroj!), kiuj admonis la popolon resti resti trankvila kaj ne ĝeni la kapitalistojn, eĉ se ĝi soifas.

Kaj tiuj sanktaj viroj, kiuj estis falsaj pastroj, atestis antaŭ la popolo, ke tiu ĉi malfeliĉo estas sendita de Dio por la savo de iliaj animoj kaj ke tiu, kiu estas pacienca kaj ne murmuras, venos post sia morto en landon, kie ne ekzistas kapitalistoj kaj kie estas abundo da akvo. Kaj la popolo, kiu ne sufiĉe konis la sanktajn skribojn, kredis tion en sia naiveco.

Estis tamen kelkaj veraj profetoj de Dio kaj ĉi tiuj kompatis la popolon. Ili ne volis false atesti por profito de la kapitalistoj, sed sin esprimis malfavore pri ili.

Kiam nun la kapitalistoj vidis, ke la popolo ankoraŭ ne trankviliĝis, ke nek la vortoj de la profetoj, nek tiuj de la falsaj pastroj havas influon, ili iris mem al la popolo. Ili trempis siajn fingropintojn en la akvon, kiu transbordiĝis kaj ĵetis la gutojn de siaj fingropintoj inter la popolon, kiu svarmis ĉirkaŭ la cisterno. Tiuj gutoj nomiĝis "filantropio" kaj estis tre amaraj.

Kaj nun la kapitalistoj denove vidis, ke nek la vortoj de la profetoj, nek la gutoj nomitaj "filantropio" trankviligis la popolon, kiu ĉiam pli furioze amasiĝis ĉirkaŭ la cisterno, kvazaŭ ĝi perfekte volus konkeri ĝin. Tiam la kapitalistoj interkonsiliĝis kaj sekrete sendis virojn inter la popolon. Kaj tiuj viroj elserĉis la plej fortajn, kiuj plej bone povas batali. Al ili ili aparte parolis, dirante : - Kial vi ne kunlaboras kun la kapitalistoj ? Se vi volas servi ilin kaj malebligi, ke la popolo konkeru la cisternon, tiam vi havos abundon da akvo kaj nek vi nek viaj infanoj bezonos pereji.

Kaj la fortaj viroj aŭskultis tiujn parolojn kaj lasis sin persvadi, ĉar ankaŭ ili estis naivuloj kaj soifis. Kaj la kapitalistoj donis al ili bastonojn kaj glavojn kaj ili skurĝis la popolon, kiam ĝi interpuŝiĝis ĉirkaŭ la cisterno.

Kaj post multaj tagoj la akvo malaltiĝis, ĉar la kapitalistoj konstruis fontanojn kaj fiŝlagetojn kaj sin banis en la akvo, ili kun siaj edzinoj kaj siaj infanoj; ili uzis ĝin por sia plezuro.

Kiam la kapitalistoj vidis, ke la cisterno estas malplena, ili diris : - La

krizo estas finita.

Kaj ili sendis virojn por denove dungi la popolon por replenigi la cisternon. Kaj por la akvo, kiun la popolo alportis, ĉi tiu ricevis por ĉiu sitelo po unu penco, sed por ĉiu sitelo, kiun la kapitalistoj donis el la cisterno al la popolo, po du pencoj devis esti pagataj, ĉar ili ja devis akiri profiton. Kaj post mallonga tempo denove superfluis la cisterno same kiel antaŭe. Kaj kiam la popolo soifis pro manko de akvo, dum tiu ĉi estis malŝparata de la kapitalistoj, tiam ribelis viroj en la lando, kiujn oni nomis malpacigantoj. Ĉar ili vekis la popolon kaj diris, ke ĝi devas unuiĝi, kaj tiam ĝi ne bezonos plu esti servisto de la kapitalistoj kaj soifi al la akvo.

Kaj en la okuloj de la kapitalistoj tiuj, kiuj tiel parolis, estis danĝeraj homoj. Tial ili volonte krucumus ilin. Sed ili ne kuragis pro timo je la popolo. Kaj la malpacigantoj parolis al la popolo tiel : - Vi malsaĝuloj, kiom longe vi ankoraŭ lasos vin trompi per mensogo. Kaj vidu vian malprofiton en tio, kio devus esti via profito, ĉar ĉio, kio estas parolita al vi, estas nenio ol mallice elpensitaj fabeloj. Kaj ankoraŭ tio,

kion diris la sanktaj viroj, ke estas la volo de Dio, ke vi ĉiam estu malriĉaj, mizeraj kaj soifaj. Ili estas blasfemantoj kaj mensogantoj; Dio akre juĝos ilin, kvankam li multajn pardonos.

- Kial vi ne rajte povas havi tiun akvon ? Ĉu ne estas, ĉar vi ne havas monon ? Kaj kial vi ne havas monon ? Ĉu ne estas, ĉar vi ricevas nur po unu penco por ĉiu sitelo, kiun vi alportas en la cisternon ? Tio estas la merkato-prezo, tamen vi devas doni po du pencoj por ĉiu sitelo, kiun vi prenos el la cisterno, por ke la kapitalistoj akiru profiton. Ĉu vi ne vidas, ke tiel la cisterno devas superflui ? Ĝi ja pleniĝas per tio kion vi nepre bezonas kaj la abundo forniĝas per tio, ke vi ne estas satigataj. Ĉu vi ne vidas, ke ju pli streĉe vi laboras kaj ju pli diligente vi serĉas akvon kaj alportadas, des malpli grandiĝos via profito kaj ĉu tio ĉiam devas resti tiel ?

Tiel parolis la malpacigantoj dum multaj tagoj al la popolo; ĝi ne atentis ilin. Sed tamen post mallonga tempo ĝi komencis aŭskulti al ili kaj respondis :
- Vi parolas veron. Estas pro la kapitalistoj kaj iliaj profitoj, ke ni suferas

mankon. Ni nun vidas, ke pro ilia kulpo ni neniam ĝuos la fruktojn de nia laboro; do nia laboro estas senfrukta, kaj ju pli rapide ni laboras por plenigi la cisternon, des pli baldaŭ ĉi tiu superfluas kaj ni ricevas nenion. - Ĉar estas tro multe da ĝi, diras la profetoj. Sed pripensu, ke ne eblas moki la kapitalistojn kaj ili estas kruelaj eĉ per siaj indulgoj. Diru al ni, ĉu vi scias rimedon por liberigi nin de ilia regado. Sed se vi ne scias bonan vojon por liberigi nin, ni petegas vin, ke vi ne okupu vin pri ni, por ke ni povu forgesi nian mizeron.

Kaj la malpacigantoj diris : - Ni scias tiun vojon !

Kaj la popolo diris : - Ne trompu nin, ĉar tiu ĉi situacio ĉiam ekzistis, neniu trovis rimedon por liberigo, kvankam multaj zorgoplene serĉis ĝin per larmoj. Sed se vi scias rimedon, diru ĝin tuj al ni.

Tiam parolis la malpacigantoj pri tiu ĉi rimedo kaj diris : - Pensu, kiaj estas viaj rilatoj kun tiuj kapitalistoj, kiel vi lasas al ili la rezultojn de via laborado. Kion do ili faras por vi, ke vi pagas al ili tiun ĉi taskon ? Ho, es-

tas, ĉar ili surmetis al vi jugon kaj difinas viajn taskojn, por poste doni al vi malmulte da akvo, kiun alportis vi kaj ne ili. Aŭdu do la rimedon por liberigi vin el la sklaveco : faru por vi mem kion ĝis nun faris la kapitalistoj por vi, difinu vian propran laboron, forskuu viajn katenojn kaj dividu viajn devojn. Tiam vi ne plu bezonos la kapitalistojn, vi ne plu bezonos zorgi plue pri la kapitalistoj kaj pri ilia profito ; la fruktojn de via laboro vi dividos kiel frat-oj, ĉiu akiros la saman kvanton, tiam la cisterno neniam superfluos antaŭ ol ĉiu estos plene satigita kaj vi faros el tio postrestonta belajn fontanojn kaj fiŝlagetojn, same kiel faris la kapitalistoj, sed tiam ĉiuj ĝuos tion.

Kaj la popolo respondis : - Kiel ni devas agi ? ĉar la rimedo ŝajnas bona al ni.

Kaj la malpacigantoj respondis :
- Elektu saĝajn virojn por reguligi viajn devojn kaj fiksi vian laboradon, ili faros, kion iam faris la kapitalistoj. Sed ili ne estos kiel viaj mastroj, sed viaj fratoj kaj la plenumantoj de via volo, ili ne atentos pri propra profito, ĉiu havos la saman parton, mastroj kaj

servistoj ne plu ekzistos. Ni estos frat-
toj kaj, de tempo al tempo, kiam vi ju-
ĝos tion necesa, vi denove elektos saĝ-
ajn virojn, por anstataŭigi la iamajn.

Kaj la popolo aŭskultis kaj aprobis la
rimedon, ŝajnis ne malfacile kaj unuvoĉe
oni kriis Lasu ĝin esti tiel, kiel vi di-
ris tion, ni volas tion. Kaj la kapital-
istoj aŭdis la bruegon de iliaj voĉoj
kaj ankaŭ la profetoj aŭdis tion kaj la
falsaj pastroj kaj la fortaj batalantoj,
kiuj devis defendi la kapitalistojn. Kaj
kiam ili aŭdis tion, ili tremadis, ke
iliaj genuoj fleksiĝis kaj ili diris unu
al la alia : - Tio estas nia fino...

Sed estis ankoraŭ veraj profetoj de
Dio, kiuj ne volis profiti per profito
de la kapitalistoj, sed kompatis la po-
polon, kaj kiam ili aŭdis la kriojn de
la popolo kaj eksciis, kion ili elvokas,
ili tre ĝojis kaj dankis Dion pro tiu ĉi
liberigo.

Kaj la popolo foriris kaj faris ĉion,
kion la malpacigantoj diris. Kaj okazis
precize kiel la malpacigantoj estis dir-
intaj al ili. Kaj ne plu estis soifantoj
en la lando, nek malsatantoj nek nuduloj
nek frostiĝantoj, neniu suferis mankon

kaj la viroj nomis la aliajn fratoj kaj
la virinojn fratinoj. Tiel ili estis ki-
el fratoj kaj fratinoj, kiuj vivadis en
harmonio kaj la beno de Dio estis por
ĉiam super tiu lando.



(Laŭ tradukoj de SAT-ano 17403
kaj de G.H.B., kompilredaktis
LJP-broŝurservo.)

Inĝ. B. B. de Regt :

L A S E N M O N A M O N D O
D E B E L L A M Y

Edvardo Belami naskiĝis la 26an de marto 1850 en Masahusetts en Usono. Li an-
fandiris en 1887 la radion, televidadon,
aertrafikon, mondhelpplingvon kaj la nun-
tempan mondkrizon kaj donis la solvon el-
iri el ĉi tiu lasta. (°)

Nun, kiam evidentiĝas, ke la meĥanika-
igo de la industrioj senlaborigas milio-
nojn da homoj, estas utile pli profunde
studadi la verkojn de Belami "Rigardo
malantaŭen" kaj "Egalo".

Por ke fariĝu neeble, ke sekve de in-
ventoj, laboristoj iĝu senlaboraj pro
la aplikado de la inventoj, Belami pro-
pagandis, ke la MONO "kiel obstaklo" mal-
aperu. Ne la kreanta forto de la invent-
istoj malfortiĝu, kontraŭe eĉ ankoraŭ
pli ol en la nuno, oni klopodu efektivigi
ke en la senmona socio stultigaj laboroj
estu farotaj de maŝinoj.

Se oni opinius, ke la privata inicia-

(°) Tiu ĉi artikolo estis verkita en 1933.

tivo perdiĝos, aŭ ke oni ne havos la necesan energion por cerbumi pri novaj aferoj pro malesto de la mono, tiam oni pensu pri tiu amaso da intelektuloj, kies spirita ĝuo pro farataj teorioj kaj praktikaj inventoj kaj malkovroj kontentigas internan evoluemon, sen ke ili per tio gajnas unu cendon, ekzemple astronomoj, biologoj, matematikistoj, ĥemiistoj, fizikistoj kaj ekonomiistoj.

Kiom da miloj da laikoj jam estis, kiuj pro pura intereso estas serĉintaj la "Perpetuum mobile" kaj kiom da aliaj estis, kiuj pro manko de mono ne povas realigi siajn inventojn. Oni rigardos kiel honoron ree esti alportinta ion novan, tiel ke spirit-malakriga laboro ne bezonas esti farata de homoj. Tiam la inventoj fariĝos beno por la homaro, dum nuntempe inventoj servas nur por riĉigi unuopulojn kaj ofte eĉ ne donas profitojn al la inventintoj mem, kaj kaŭzas al aliaj homoj senlaborecon.

Interŝanĝkomerco inter la individuoj ne okazos, ĉar ĉiu ricevos ĉeklibron, per kiu li povas havigi al si, kion li bezonas por la ĉiutaga vivo kaj distro. La ĉekskribado estas jam nun ĝenerala; la diferenco estas tamen, ke oni nun, ĉu

mem aŭ iu alia devas deponi monon kaj post tio povas skribi ĉekojn, dum oni ricevos en la Belami-socio ĉeklibron kiel rekompencan por faritaj aŭ faretaj servoj. Interŝanĝkomercado ankoraŭ okazos inter diversaj regionoj, kaj ne, tiel kiel ni jam rimarkis, inter la homoj mem.

Ekzemple ni povus transporti ovojn al alia regiono, dum tiu regiono povus transporti al ni duonlaboritaĵojn. La varvaloron oni povas montri, aŭ per mono, aŭ per laborhoroj, aŭ per alia maniero.

Viroj kaj virinoj estos samrajtaj; oni vizitos ĝis la 19a vivjaro lernejon, poste oni povos studi plu, se inklino, intelekto, talento kaj kapablo rajtigas tion. Se oni ne montras inklinton al plua studado, tiam oni tuj post la lernotempo komencas labori. Ĉiu laboros nur tiom da horoj, kiom montriĝos necesaj por la ĝeneralaj bezonoj kaj la plej malagrablajn laborojn oni igos allogaj, per proporcia malpliigo de la laborotempo (laborhoroj). Troproduktado malebliĝos, ĉar nur tiom estos produktata, kiom estos necesa por propra ekzisto aŭ por akiri varojn, necesajn kiel interŝanĝaĵoj kun aliaj regionoj.

Plej unualokaj estu gvidkapablaj perso-

noj, kiuj estos elektataj el kaj de la plenkreskaj interesigantoj. La maltrankviliĝo pro la estonta tempo malaperos, ĉar ĉies ekzisto estos certigita. Estas tute superflue, ke iu ricevu, ekzemple monate, pli grandan sumon sur sian ĉeklibron ol alia homo.

La elspezoj reguliĝas laŭ ĝenerala bezono kaj aĝo. Estante kripla, invalida, nenormala, malsana, blinda, muta, ktp, oni havos precize la samajn rajtojn kiel ĉiu, materie kaj (aŭ) mense perfekte simila. Oni laboras ĝis la 45a, poste oni povas esti vokata ĝis la 55a, por helpi mildigi suferojn dum eventualaj naturkatastrofoj aŭ epidemioj. Ankaŭ infano ricevos ĉeklibron, kiu estos administrata de la gepatroj aŭ zorganto ĝis ĝia plena maturiĝo.

Proksimume 90 % el la nunaj krimoj rezultas el avido kaj granda parto de la frenezulejoj estas loĝata, ĉar la homoj nerve malsaniĝas pro perdo, nehavo, aŭ pro mondezirego. Ankaŭ la malliberejoj kaj same la frenezulejoj fariĝos pli kaj pli superflujaj.

Se iu laŭ sia naturo pro apatio ne povas aŭ volas disponigi siajn fortojn por la socio, tiam li estu instruota de spe-

cialaj pedagogoj. Oni instruas lin interesiĝi pri la komunumo.

Jen konciza skemo, elpensita jam en 1887 de Belami, por solvi la mondkrizon. Sola la perioda mizero povos efektiviĝi ĉi tiun ideon, ĉar solvo estu trovota, per kiu ĉiu, kiu estas kapable laborvola, povos akiri laboron. La kriza mizero igos laŭgrade la homojn kapablaj ekkompreni la vojojn montritajn de la grandaj pioniroj de la homaro, inter kiuj Belami ne estis la plej malgrava.

(Tiu ĉi artikolo origine aperis en "Sennacieca Revuo" de 10. sept. 1933)

 Pri disdona ekonomio haveblas ĉe Abundana Frakcio de S.A.T. jenaj broŝuroj:

Alveno de abundo (P.V. Berthier)	FF 0,60
La rentumo, kiun ni pagas (Schmid)	0,30
La granda liberigo (J. Duboin)	1,00
Liberigo de timo (Bellamy-asocio)	0,60
Maŝinoj, mono k mondpaco (Socikred.)	1,50
28 bultenoj de Abundana Frakcio	4,50

Adresi la mendojn al: Kdo A. Naudé
 31 rue Folie l'Abbé
 F 02400 Château Thierry (Francio)
 poŝtkonto: 6475-48 Paris

Broŝurservo de La Juna Penso:

Komuna Kantareto	FF 0,60
Gandhi kaj satjagraho (3 prelegoj) ..	1,00
La Tabuo (novelaro de J. Nesvadba) ..	1,00
Initiation à l'Esp-o (An Kaù) ..	1,00
La laborista esperantismo (Lanti) ..	1,00
Alveno de abundo (P.V. Berthier) ..	0,60
En anarkista socio... (J. Grav) ..	0,30
La rentumo, kiun ni pagas (Schmid) ..	0,30
Ĉu neperforta revolucio.. (Ebert) ..	1,00
Vivi en komunumo (M. Schneller) ..	0,60
Manlibro de nova homo (Rufegon) ..	1,00
La granda liberiĝo (J. Duboin) ..	1,00
Esperanto en 24 pages ..	0,60
Pri edukado ("Vortoj" de Lanti) ..	1,20
Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti) } ..	1,50
Rimarki (kompilo el Krishnamurti) }	
Memvola servuto (La Boesi) ..	1,20
Du rêve à la réalité (H. Masson) ..	1,50
El leteroj de E. Lanti ..	1,20
Por la paco (citaĵoj el famuloj) ..	1,20
Prognozio (novelaro el la pola) ..	1,20
Esperanto en 24 páginas ..	0,60
Nekombitaj pensoj (S. J. Lec) ..	1,00
Rido sanigas! (poemaro de Burger) ..	1,20
La liberecana penso (citaĵoj) ..	1,00
Anarkio kaj organizo (Malatesta) ..	1,00
Absolutismo (prelego de E. Lanti) ..	1,00
Ne mortigu! (Leo Tolstoj) ..	0,30

.../...

